# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 12/05/2022 Kvincentokdekudua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 734,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **300,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **176,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **156,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **102,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde 2022 ?? ???)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



la esperanta retradio

Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan

Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.



REZIGNO PRI BOVA VIANDO POVAS SAVI ARBAROJN

7A MAJO 2022

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917

**EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**

**Numero 14 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kiom da literoj estas en la Esperanta alfabeto?

2). Kiu frazparto estas "alpariza" en 'la alpariza vagonaro"?

3). Ĉu oni en Esperanto rajtas meti parton de unu frazparto en alian frazparton?

4). La germana havas la konjunkcion "denn" kaj la subjunkcion "weil"
por praktike la sama signifo "ĉar" en Esperanto.
Kial Zamenhof kreis por tiu signifo nur unu konjunkcion/subjunkcion?

5). En kiu libreto Zamenhof diris dek-du fojojn ke la gramatikaj reguloj baziĝu sur
la logiko kaj nur unu fojon ke ĝi ne baziĝu sur la logiko?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 582 *Marcel Leereveld.*

## MILITOJ ESTAS KRIMOJ KONTRAŬ HOMOJ, BESTOJ KAJ NATURO

Mi metos la MILIT-partiojn la LASTaj en la baloton la 21an de majo 2022

La ĉefministro sole povas iniciati militon kaj li/ŝi estas elektita per la sukcesa partio ne la Aŭstraliaj Balotantoj.

Tial kontraŭmilitaj balotantoj nur povas voĉdoni por la du kontraŭmilitaj kandidatoj de Civitana Partio kaj Socialista Egaleca Partio nur se ili estas sur la balotilo, aŭ sendependaj kandiktoj se ili ne estas.

Meti la ĉefajn militpartiojn absolute la lastaj en la baloto por malhelpi WW3 estas multe pli grava ol iuj aliaj subaĉetaĵoj, kiujn oni proponas por esti elektitaj. *Roger Springer*

**La planedo estas en danĝero. Ĉu vi voĉdonus por MILITO aŭ PACO?**



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.

La 7a de majo estis la unua sabato Venis Roger, John, Chris kaj Ian. Ne pluvis, suno brilis.



Iris Libby en apoteko demandis la apotekiston ĉu li havas ion kontraŭ singultado!

Tuj li batis al ŝi la vizaĝon dirante: "Mi certas, ke via singultado nun estas finita!"

"Ne", respondis Libby, "mia fratino ankoraŭ sidas singultante ekstere en la aŭto!

*Bob Felby*

## Azovstal Factory.. NATO Dirty War Secrets - Titanic Lifeboat Academy

"Nacio, kiu timas lasi sian popolon juĝi la veron kaj malveron en malferma merkato, estas nacio, kiu timas sian popolon." — *John F. Kennedy*

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** AE582 *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917* **Numero 14**

1). 28.
2), Epiteto.
3). Ne.
4). Ĉar unu sufiĉas, kiel en la angla.
5). En "Lingvaj Respondoj". *Marcel Leereveld*



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** AE581 *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917* **Numero 13**

1). Vidu ilin en lernolibroj aŭ en kelkaj vortaroj.
2). I.a.: Ke predikativo havas la nominativon.
   2.a: Ke se simpla adverbo estas en la akuzativo, ĝi ne ricevas la finaĵon "n".
   3.a: Ke se "la" estas mallongigata al "l", ĝi kombiniĝas kun antaŭa prepozicio se tiu finiĝas per vokalo.
   4.a: Ke la artikolo ne uzatas antaŭ indikaj pronomoj nek antaŭ tabelvortoj kaj similaj.
   5.a: Ke por la nedifina artikolo oni povas uzi "iu" kun eventualaj finaĵoj.
3). Ankaŭ sola radiko havas signifon.
4). Ke; se; escepte; kondiĉe ke; ĝis; kaj tabelaj "k-" vortoj. *Marcel Leereveld*



# Ukrainujo ne estas afero de Usono!

Ukraine is none of America's business! – The Greanville Post

Rusujo neniam sekrete kaptis Meksikon,
sed en februaro 2014, Usono sekrete kaptis la kontrolon de Ukrainujo.

Ukrainujo limas kun Rusujo, ne Usono. Meksiko limas kun Usono, ne kun Rusujo.

## MILITOJ ESTAS KRIMOJ KONTRAŬ HOMOJ, BESTOJ KAJ NATURO

## 3ZZZ

En la elsendo de la 9a de majo 2022 eblas aŭdi pri Zimbabvo, Gandi kaj literaturo en Esperanto *Franciska Toubale*

